



La Suda Kruco

*Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio
Fondita en Julio 1920.*

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O., Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por 12 numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.

Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj.

Redaktisto: Reginald Banham, F.B.E.A.

Specimena numero—unu respondkuponon aŭ 30 c. U.E.A. kuponon.

Unu numero: 4 pencoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 135 (Tenth Year) Melburno (Melbourne), Aŭstralio. SEPT.-OKT., 1931.

N.Z.E.A. SECTION.

In common with other countries, New Zealand is feeling the full force of the economic crisis; and so are the various national organizations, etc., the New Zealand Esperanto Association not being an exception. The case of the N.Z.E.A., however, gives cause for certain satisfaction to its office-bearers, for notwithstanding the fact that the depression is affecting seriously the strength of the N.Z.E.A. membership—about 50 members are still required before last year's figure is equalled—the useful work of the Association is very little affected, and the work of furthering Esperanto is steadily continued. In prosperous times the N.Z.E.A. will no doubt enjoy the full financial support of its past and present membership (250), for in such times a subscription of half a crown is inconsiderable; whereas now, when almost everyone is making sacrifices and many are wholly unemployed, the amount represents a substantial sum. Appreciation of the manner in which many old friends have stood by the Association (and the movement, too) at a time when help is most needed, must, however, be recorded—their loyalty will be remembered in later days when reference is proudly made to the "healthy state of our membership." During 1931 the N.Z.E.A. has obtained ten new members for itself and one for the U.E.A., and five members have paid subscriptions for next year. The N.Z.E.A. also acknowledges with thanks donations from Messrs. D. J. Munro, Tarras, and B. Berry, Kai-kohe (7/6 each), and T. G. Creedon, Taumarunui (2/6).

CONGRESS AFTERMATH.

The N.Z.E.A. received an enormous quantity of work from the 2nd Congress. All records and reports were prepared, and the following tasks, decided upon by congress, were undertaken: Copies of congress resolutions were supplied to the Prime Minister (Hon. G. W. Forbes), to the Minister of Education (Hon. H. Atmore), and to the Minister in charge of Tourist and Health Resorts and Publicity Department (Hon. T. K. Sidey); efforts are being made to have a remit favoring Esperanto discussed at the next teachers' conference; a draft questionnaire is to be sent to all candidates at the general election has been prepared for the N.Z.E.A. Executive's approval; additional broadcasting facilities are being sought from stations 1YA (Auckland), 2YA and 1WZ (Wellington), and 4YA (Dunedin); and preliminary correspondence has been written in connection with the 3rd Congress—due to be held at Christchurch next Christmastide.

EXECUTIVE DECISIONS.

During the past quarter the Executive decided to donate £1 to "La Suda Kruco"; to issue to all members a circular letter setting out the position of the N.Z.E.A.; to appoint a personnel of the Examination Committee as follows:—Messrs. E. C. Jack (Chairman), W. L. Edman-son, L. E. Dust, Bertram Potts, and W. H. King (Secretary); and that in view of the present unsatisfactory circumstances, political and economic, together with the fact that a general election is approaching, not to arrange

another deputation to the Minister of Education in the meantime.

N.Z.E.A. MEETINGS.

Since publishing the 6th "Official Bulletin," three meetings—two Committee and one Executive—have been held; the Examination and the Tuition Committee met on 24th June, and the Wellington members of the Executive on 24th July.

The Examination Committee discussed the scope and the forms to be used in the N.Z.E.A. oral test, and the question of appointing qualified examiners at the three centres, Auckland, Christchurch, and Wellington. A list of names was prepared, and the secretary was instructed to obtain the consent of the Esperantists concerned to nomination by the Committee to the N.Z.E.A. Executive.

Directed by congress, the Tuition Committee investigated the establishing of a course of Esperanto tuition by correspondence, and unanimously made an affirmative decision. A suitable course will shortly be drawn up.

The local members' Executive meeting decided that the secretary should write to (1) the Wellington Branch of the League of Nations Union outlining the recognition given Esperanto by the League itself and asking the Branch to discuss the subject and to accord support by passing a favorable resolution; (2) the Prime Minister, requesting him to instruct the New Zealand representative at the League of Nations to introduce the question of Esperanto with a view to obtaining the League's official authorisation of Esperanto-teaching in the schools of the members of the League; (3) the Editor of "La Suda Krucio" informing him that provided the gazette appears with a certain degree of regularity the N.Z.E.A. will extend in the future the same support as given in the past; (4) Mr. L. E. Pfahl, Sydney, enquiring the position regarding the congress proposed to be held at Sydney early next year.

INTERNATIONAL CO-OPERATION.

The N.Z.E.A. is ever willing to co-operate internationally. It has forwarded a letter congratulating the N.S.W. Minister of Education upon his decision to permit the instruction,

as an experiment, of Esperanto in a State school for one year; provided a list of New Zealand Esperantists and supporters to the Esperanto Society, Sydney, for use in connection with the projected congress; and supplied information on the Dominion's system of radio broadcasting and control to Mr. S. Meusch, Nieuwe, Netherlands. Furthermore, a statement regarding Esperanto and Scouting was obtained from the Chief Scout, Lord Baden-Powell, during his recent visit to the Dominion, and forwarded to the Scout's Esperanto League, Netherton, England; and an outline of the Esperanto movement in New Zealand was supplied to Mr. L. C. Mansfield, Perth, W.A., who sought particulars.

PROPAGANDA.

Although valuable work is being accomplished in this field by clubs and isolated Esperantists, the N.Z.E.A. does not allow to pass an opportunity to propagand. Official letters have been written to "The Dominion," Wellington (Defilement of English), "The New Zealand Observer," Auckland (2nd Congress), "The Otago Daily Times," Dunedin (A Universal Language), and with Mr. Bertram Potts, Secretary of the Wellington Club, arrangements were made for the publication in the newspapers (2) at Wellington and at Lower Hutt, of a splendid half-column article relating to the recently appointed Lectureship of Esperanto at the Liverpool University.

F.O.R. AND ESPERANTO.

On 24th July, the N.Z.E.A. secretary attended a committee meeting, held at Wellington, of the New Zealand Branch of the International Fellowship of Reconciliation for the purpose of discussing the work and value of Esperanto. The committee accorded an attentive hearing, and decided to suggest to F.O.R. headquarters that the Fellowship's official "Statement of Purpose" should be enlarged to include a paragraph recommending increased study and use of Esperanto. A circular about to be issued by the committee to the F.O.R. membership is to contain a reference to Esperanto and a special report covering

N.Z.E.A. activities. Special thanks are due to Mrs. M. Drury, Hon. Sec., of the F.O.R. in New Zealand, who was instrumental in having the matter brought forward.

SECRETARY'S REMINDER.

N.Z.E.A. subscriptions (2/6 per annum) fell due on 1st April last. Correspondence should be addressed to the Honorary Secretary, N.Z.E.A., 10 Queen-st., Wellington.—W.H.K.

NEKROLOGO.

Je la 23a de Julio, 1931a, forpasis ankoraŭ unu el la plej bone konataj pioniroj de Esperanto en Nov-Zelando—s-ro James Hampton, D.B.E.A. Li mortis ĉe Christchurch, kie li naskiĝis antaŭ 56 jaroj.

Scipovinte stenografion (Pitman'an k. Gregg'an), s-ro Hampton legis pri "la nova internacia lingvo, Esperanto" en "Pitman's Magazine" en la jaro 1904, tuj akiris lernolibron, kaj gajnis la B. E. A. diplomon en Julio, 1907. Li interkorespondis per i.p.k. alilande pogrande kaj diligente propagandis dum multaj jaroj. Unu el liaj ĉeflaboroj estis fondi la Christchurch'an Esperanto-Klubon, kiun li faris post klarig-parolado liverita ĉe publika kunveno okazigita ĉe la "Norma Lernejo," Christchurch, en 1906. Liaj kunoficistoj tiamaj estis s-roj Cedric F. White, O'Bryen-Hoare, kaj Rabeno I. A. Bernstein (Vic-prezj.), s-ro J. A. Clarke (Hon-Sek-o), s-ro T. Newburgh (Hon. Kas-o), s-ino A. Chapman-Taylor (Hon. Bib-o), s-roj E. D. Bernstein, C. J. Whittaker, R. W. Eastwood kaj Prof. Bickerton (Komitatanoj), kiujn multaj restantaj pioniroj kredeble bone memoras.

Kun lia edzino, kiu postvivas lin, s-ro Hampton aniĝis (N-ro 10533) al la B.E.A. en 1904, kaj samtempe abonis al "La Esperantisto" (en 1905 ŝanĝita al "La Brita Esperantisto"); kaj li aliĝis al la nuna N.Z.E.A. je starigo de la asocio en 1929, sed pro premo de negocaferoj li devis forlasi sian por Esperanto laboron publikan. Fine la sano rompiĝis kaj, malfeliĉe, li estis vokita antaŭsiatempe. Nian profundan simpatian, kaj Esperantistaran dankon pro laboro kuragege kaj fidele elfarita.

—W.H.K.

KRONIKO.

Perth, W. Aŭst.—Nune ni semojn disŝutas en la frukteman teron de l'gejunula menso. La 4an de sep-o s-ro Byatt vizitis al la Metodista Halo ĉe Nedlands, por paroli al junuloj pri Esp-o. S-ro Claxton, per trafvorta traktaĵo, stimulis ilin ĝis granda entuziasmo. F-ino Byatt kantis Esperante, per tio, montrante, kiel oni povas la lingvon ankaŭ tiumaniere uzi.

S-ro A. Saar atentontene alparolis geanojn de la A.N.A. (asocio de en-Aŭstraliaj naskitoj) ĉe Suda Perth. Post kiam tiu klarigis la devenon kaj celon de Esp-o, s-ro Claxton donis malmultevortan trakton, rimarkigante kiel logika, scienca kaj bela estas la interlingvo. La kunvenintoj streĉe aŭskultis kaj inteligente metis demandojn. Iuj deziras eklerni.

Wellington, N.Z. — Interesplenan parolon pri Esp-o liveris s-ro E. Jack, prez-o de la ĉi tiea Esp-Klubo dum julia vespero al ĉ. 30 junuloj ĉe "Donbank," pensonego de la Kristana Junularasocio (Y.M.C.A.). La 27an de aŭg. s-ro Jack lekciis al 59 membroj de la loka grupo de la Societo de Nov-Zelandaĵ Sekretarioj. Kapable pritraktante sian temon, li forte impresis la aŭskultantojn, inter kiuj troviĝis multaj el tre varbinda tipo, kaj multaj neniam antaŭe havintaj okazon aŭdi la faktojn pri Esp-a progreso: Bona laboro en tutnova kampo.

De post lasta raporto la W.E. (laboristkultura) klubo ĉiumarde laboris jen-programe (krom unu horo da instruo ĉiukunvene):—

28 julio: Paroladis s-ro E. C. Jack, La Ligo de Nacioj kaj Ĝia Raporto Pri-Esperanta, s-ro W. H. King, La N.Z. Esp-o Asocio, s-ro Josefo Major, Psikanalizo. Originala komedio, La Interpretisto renkontas Francan Vizitanton, rolis f-ino C. Smythson, s-roj V. Leck, Bertram Potts, kaj Major.

4 aŭg.: Parolado de s-ro Jack, La Disvastiganta Utilo de Esp-o; originala humoraĵo, La Afero de la Paciento, rolis s-roj Potts kaj Major.

11 aŭg.: Paroladis s-ro Jack pri Esperanto kaj Rotario; originala komedio, La Stranga Eraro, rolis f-inoj Smythson, G. Carty, s-roj Leck, Major kaj Potts.

18 aŭg.: Legado de s-ro W. T. Brown, La Pesimisto parolis al Amiko,

de s-ino Drury, La Skota Farmisto vizitas la Urbegon; f-ino E. M. Penman deklamis Kiam Nigra Kokino demetas Ovon, s-ino Potts prezentis La Signo super la Butiko, kaj s-ro L. Meredith, La Soldato respondas al la Oficiro. Interese lekcias s-ro Major pri Kriminologio. Originala komedio, La Poŝt-oficisto havas Surprizon, rolis f-ino Smythson, s-roj Potts kaj Major.

25 aŭg.: Farante semajnan alparolon kiel prezidanto, s-ro Jack konrice traktis pri Esp-o kaj Eduko. F-ino Smythson legis lumigan artikolon el eŭropa ĵurnalo pri la Progreso de Esp-o en Nov-Zelando; s-ro L. Dust kapable lekcias pri Arheologia Esplorado en Pompejo; lego de s-ro Brown, La Knabo parolas pri la Horo; originalan komedion durolan, Tro Avida, prezentis f-ino Smythson kaj s-ro Potts.

Krom la distro kaj kulturo, kiujn tiaj programoj havigas al klubanoj, la ĝenerala movado profitas ilin, ĉar taggazetoj sendataj ĉien en la Dominio enhavas tiukoncernajn raportojn, kompilitajn de s-ro Potts, kies laboro foje instigas homojn ekenketi en diversaj lokoj.

Christchurch, N.Z.—S-ro N. M. Bell lastatempe grave malsaniĝis, kio kaŭzis al liaj amikoj akutan maltrankvilon. Lia efika laboro ĉe la laboristkultura kurso, radidissendo, kaj monata Esp-a kolumno en la "Christchurch Star" estis daŭrigataj de kunlaborantoj. Baldaŭn resanon!

Coburg. — The Coburg Esperanto Group still meets for study every Thursday evening in the Labor Hall, Sheffield-st., Coburg. Like all growing things in the depth of winter, the organisation has been more or less at a standstill during the last two months. But doubtless the weather is not so much to blame as the distressing economic conditions, which are interfering with the regularity of members' attendance, and discouraging those who might otherwise be disposed to devote time to our worthy cause.

We are, however, not downhearted, and still hope to be well represented, when the results of the Pyke Memorial Examination are announced.

The return of Mrs. A. Hintze, after an absence of several weeks through ill-health, was hailed with sincere

pleasure. All members are glad that she is practically restored to her former self, glad for her own sake and that of the Club, on whom she has such a stimulating influence. During her absence Mr. Glaisher, of the Melbourne Club, kindly came to the rescue and instructed Mrs. Hintze's class. It will indeed be a boon to Coburg if he can give his able assistance indefinitely.

EL LA FOLIETO DE LA MELBURNA KLUBO.

"Ĉe Moe, Viktorio, s-ro Max Schmidt starigis grupon el naŭ kursanoj. Li ankaŭ penas fondi grupojn inter skoltroj ĉe Trafalgar kaj Yallourn."

"De post la jaro 1923 la sekretario, s-ro Rawson, ĉiun kvaran sabaton disaŭdigis paroladon pri Esperanto de la radistacio 3LO, Melbourne. Kiel rezulto de tiuj ĉi paroladoj li ricevis multajn leterojn. Kutime proksimume ĝis 30 leteroj alvenas monate de aŭdintoj, kiuj deziras pluan sciigon pri la lingvo. Ofte pli granda nombro riceviĝas. Fakte tiom multe kiom 135 leteroj riceviĝis dum unu monato. Al ĉiuj leteroj la sekretario respondos persone. Ne malgranda devo."

Eĉ de malproksima Kvinslando kaj Nov-Zelando venis informpetoj.

Je la 19a de aŭgusto s-ro Drummond por la klubanoaro prezentis al s-ro E. McKenzie kaj f-ino Belcher edziĝan donacon el kristala pelvo kaj vesperservico.

La 26an s-ro M. Hyde, mallonge feriante en Melburno, alparolis la klubon pri Brisbano. Oni diras, ke s-ro Hyde estas la plej fluparola Esp-isto ne nur en Aŭstralio sed eble en la tuta Suda Duonsfero, kaj oni nur devas aŭdi lin paroli esperante, por konvinkiĝi, ke la famo estas vera.

S-ro C. Hughes, kiu estas instruisto ĉe la lernejo kaj estro de la grupo, raportas pri la Esperanto-klubo ĉe la Brighton-a Teknika Lernejo. "Dum 1931 ni havas Esp. klubon ĉe la suprenomita lernejo. Ĝi kunvenas dusemajne kvardek minutojn. Ni, ankaŭ dusemajne, eldonas esperante gazeton por la klubanoj. Estas 20 membroj. Ĉirkaŭ 200 knaboj deziris aliĝi la klubon, sed la reguloj de la lernejo permesis nur 20. La plej bonaj knaboj do estis elektitaj, kaj progresas rapide. Ili scias la gramatikon kaj malgrandan vortaron.

Ili legas kaj nun lernas paroli."

Ni jam luis la Queen's Hall, Collins-st., por koncerto, kiu okazos la 2an de decembro. Ĉe tiu koncerto oni deziras kunigi la tutan Esperistaron de Melburno. Ni tre streĉe penados por prezenti taŭgan programon.

KION VI SCIAS?

Respondoj.

1. Estis iam opinio, ke la vejno direktigas de la tria fingro al la koro.
2. Dekdu je ĉiu flanko.
3. Nigra ŝinto ne estas grava, sed blua iu-foje estas.
4. La aramean lingvon.
5. Napoleono.

(El "Amerika E-isto.")

TO OUR SUPPORTERS.

Thank you for the following:—

Mr. H. Love, 4/6, June, '32; Miss P. McCabe, 4/6, June, '32 (gift 1/-); Mr. Yuzo Hazegawa, 4/-, July, '32; Sales, Club, 3/-; Dr. F. Williams (sale), 10/-; Miss Chisholm, 5/-, May, '32; Miss D. Bell, 5/-, July, '32; Miss K. Krass, 5/-, July, '32 (1/- adv.); Mr. F. Pavlinovich, 9/6, Mar., '32; Mr. A. Slade, 4/6, July, '32; Anony., 10/-; N.Z.E.A. (subsidy), 22/6; Mrs. Trewin, 4/- (pd. Feb.); and nine others.—Total: £6/8/11.

KIAL NE APERIS SEPTEMBRA NUMERO?

Laŭ kontrakto kun N.Z.E.A. devas aperi oktobra n-ro. Je la 13a de Aŭgusto mi havis disponebla £2/2/-, kiu sumo, laŭ mia antaŭzorga konstato, ne rajtigis min estigi ĉe presisto ŝuldon £4/15/-, koston de unu numero. Tial, la 17an de Aŭgusto, mi urĝe flugigis informojn al ĉ. 20 personoj, petante reabonon. Nur kvar respondis monbilete. Verdire, N.Z.E.A. sendis subvencion 22/6 (por oktobra n-ro) kaj du homoj kune 19/6, sed tro malfrue por pravigi eldonon de septembra. Se tiu monate mi estus aperiginta "Sudan," sendube fiaskus pro monmanko la precipe grava specialnumero de N.Z.E.A.

Kio estas al tiuj, al kiuj mi jam sendis diverstempe avertojn pri abonkonsumiĝo? Pli ol £35 devus laŭrajte kuŝi en nia organiko. Sendube aferoj mone krizas ĉe multaj poŝoj, sed, ĉe enkulante tion, konstatende estas, ke generale respondo al miaj alvokoj estas tre guteta, ĉagrena. Ne pagintaj jam de

1928 kaj ricevintaj jam kvinon de avertoj, certaj homoj ne volas sendi al mi ĉe linion klarigan.

Vekiĝinte el indiferenteco, sentante vian ŝuldon, oferu teatran bileton, aŭ necesasan galanterion, por ke nia organeto ne sensuke fariĝu periode-aperanto, stumple faliranta al tombo.

—Redaktanto.

ESPERANTO KAJ RADIO

BRODKASTOJ EN N.Z.

Du stacioj en Nov-Zelando, dissendas E-ton, nome 3YA (Christchurch) kaj 1ZR (Auckland). De la unua s-ro N. M. Bell, M.A., longatempe regule parolis ĉiusesemajne, kaj pastro T. R. Wolloxhall jam de 24 junio parolas el 1ZR pri E-to. En 16 septembro li traktos pri "Esperanto en lernejoj de la tutmondo."

1928, 1929, 1930
JARKOLEKTOJ DE "LA
SUDA KRUCO" ESTAS
HAVEBLAJ.
ĉe Box 731, P.O.
Elizabeth-st., Melbourne.

Interesaj artikoloj kaj skizoj Esperant- kaj angalingve.
Pike atentotenaj prilingvaĵoj kaj librorecenzoj.
Prezo: tri ŝilingoj, inkluzive sendokosto, por ĉiu.
(fratorganoj bv. represu)

ESPERANTO EN PAPUO.

D-ro Fred. J. Williams, iama membro de la melburna E. klubo kaj pliposte prezidanto de la sidneja E. societo, nun deĵoras kiel registara kuracista funkciulo ĉe Samarai, plenumanta krome oficon de delegito U.E.A.

Liaj devoj kiel kvarantena oficulo ekestigas al li oftajn bonokazojn por propagandi Esperanton ĉe vizitantaj ŝipoj. La ŝalupo, kiun provizis al li la registaro, portas la nomon "L'espero."

Alia Esperantisto nelaŭte sed efike laboranta estas pastro A. H. Lambton, de la anglikana misio ĉe Gedulalara, pervoje de Samarai; li estas traduke revestanta en Esperanton kelkajn ferakontojn el la papua lingvo.

"LA 3AN DE DECEMBRO, 1854"
de Nathan F. Spielvogel,
en "The Lone Hand Magazine."
(Finata)

Petro Lalor kuris ĝis la barikadoj.
"Ĉi tien, knaboj!" Donu al ili salvon!"
El la fosista vico ekfulmis linio da
fajro. La soldatoj iome haltis.

"Ankoraŭ unu tian kaj ni jam ven-
kos," instigis Lalor.

Elkrakis ankoraŭ amaspao.

La ruĝvestuloj komencis disiĝi en
malordo.

La voĉo de kapitano Wise aŭdiĝis
riproĉe super la bruego. "La 40a! Ĉu
vi intencas retiriĝi?"

Tio estis liaj lastaj vortoj. Kuglo
trafis lin en la fruntomezo, kaj neniam
plu li parolis.

"Ankoraŭ unu salvon!", venis de
Lalor.

Ree oni obeis.

La soldatoj nun retiriĝis malorde.
Sed iu kuraĝa knabo klarionisto—lian
nomon oni nun ne tenas en memoro—
grimpe sur muron, trumpetis la
"Kure ataku," kaj ankoraŭ denove,
denove, denove, li tion faris tra tuta tiu
mallonga sed sanga duonhoro. Eĉ ne
unu fosisto levis pafilon kontraŭ li.
Tie li staris urĝante antaŭen la solda-
tojn.

La tonoj rekuraĝigis ilin kaj reme-
morigis al ili la tradiciojn de la regi-
mento, la honoron de ilia insula hejmi-
lando — kriegante, huraante, denove
antaŭenkuris la malgranda armeo,
dragonoj, rajdpolicanoj, infanterianoj!

La laste nomitaj, nezorgante pri la
kugloj, kiuj terenfaligas iliajn kamara-
dojn, surgrimis la barikadojn el ligno-
platoj kaj minruba kaj renversitaj ĉaroj.
De sur la supro ili eligis salvon post
salvo sur la ribelantojn. Tuj kiam
kapo aperis el barako, aŭ tendo, aŭ
sakto, ŝprucis pluvo da kugloj ĉirkaŭ
ĝin.

La fosistoj nun haose cedis lokon.
Lalor starigis sin supre sur kovrita per
traboj ŝakto. Neatentite de li kugloj
fajfis apudege.

"La venko estas nia, kamaradoj! Nun
aŭ neni—" Li ekklinis sin flanken,
ŝanceliĝante, sed sukcesis firmigi sin
per ekteno al lignoplato de la nefortika
konstruo. Lia vizaĝo estis kadavre pala.

"Antaŭen, kamaradoj—" Tiam oku-
loj kaj cerbo nebuliĝis. Li peze falis
teren, tiamaniere ke la platoj pro el-
lokiĝo frapfalas sur lin.

La soldatoj vidante lin fali elpuŝis
triumfan krion. Ili nun estis interne de
la Stockade.

Paniko, freneza senprudentiga paniko,
ekkaptis la fosistojn. Iuj, transsaltinte
la barikadojn, rifuĝis inter la montar-
ojn malantaŭ Canadian (5)—unu vun-
dita mizerulo tie mortigis pro malsa-
tego—aliaj eniris ŝaktojn kaj funde tie
kaŭris.

Sed forta Jock Robertson, netrudi-
ĝema kiam ekzistis aliaj ĉefoj, sed
preta je respondeco kaj kuraĝa kaj
firmstara pro tio, ke frontis lin krizo,
kriegis: "Ataku per ŝtalo!"

Tri paŝojn antaŭen li faris. Tiam
ruĝa makulego ekaperis sur lia maldek-
stra korpoflanko. Li deŝiris sian ves-
taron kaj kuŝis en dolorego tordigante
kaj baraktante sur la grundo.

Ross—kiu antaŭ du tagoj tiel ĝaje
marŝis ĉe la fronto de la procesio al
tiu loko—nun arigis la restintojn ĉirkaŭ
tiu nova blua kvartagaĝa flago. Estis
kvindeko da ili, armitaj per pikilegoj
kaj glavoj. Jam de longe pafaĵo el-
ĉerpigis.

Tiu rondo da fosistoj, en bluj bluzoj
nomitaj "jumpers" (elp. ĝumpers) kaj
stribhavaj trikotoj, silente staris aten-
dante morton. Ĉiam pli proksime al-
venis la soldatoj kun bajonetoj alfiksitaj.

"Al ili!", instige kriis rajdpolicano.
Kompatinda Teddy Thonen, iu vendisto
de limonado, staris antaŭ la flago. Li

—HEROLDO DE ESPERANTO—

estas la ĉiusemajna, supernacia kaj superpartia ĵurnalo de Esperantujo.
Aperas jam 11 jarojn, regule kiel horloĝo, en granda formato, kun bonaj
informoj pri la Esperanto-movado kaj el ĉiuj sferoj de la tutmonda vivo.
Bonstila redaktita, riĉe ilustrita. Sendependa de iu ajn organizacio, sed ser-
vanta al la tuta movado.

Petu senpagan specimenon, kun senpaga riĉenhava „Katalogo de Libroj“!

„HEROLDO DE ESPERANTO“

Koln (Germanlando), Brüsseler Strasse 94.



estis huraanta kaj krianta en sia gepatra Germana, kiam kuglo enflugis lian malfermitan buŝon:

"Goja Jack," sennoma vaganta malŝparulo, subite sidigis. Turninte sere nan vizaĝon al unuokululo Ted McGlyn (elp. maglin), kiu kuŝis sangante kaj ĝemante, li diris per firma voĉo, "Mi hejmen iras."

Li ektenis la manon de sia kamarado.

"Adiaŭ, kamaraĉjo, adiaŭ."

La soldatoj kaj policanoj nun kuregis supren laŭ la deklivo: restis nur malmultaj jardoj inter ili kaj tiu blua flago kun ĝia areto da pormorte difinitaj defendantoj.

"Deŝiru tiun ribelulan flagon!" ordone kriis kapitano Thomas. "Antaŭ en, bonuloj!"

Ross el Toronto saltis el la rondo de fosistoj. Li ĵetis sin rekte inter la soldatojn, bategante dekstren-maldekstren per sia glavo. Bajoneto penetris lian bruston. Ĝi eltiriĝis kaj denove eniris. Jam la brava Kanadano plenumis sian ĵuron.

Tinto de stalo kontraŭ ŝtalon! Bajonetoj sur krudajn pikilegojn! Huraoj kaj fiĵuroj! Kun buŝoj malfermitaj, okuloj flamantaj, la du armeetoj interbatalis simile al sovaĝaj bestoj.

Sindediĉo al afero, sentimeco, braveco, ne povis longe rezisti antaŭ disciplino kaj supera nombro. La malgranda fosistaro estis frakasita kaj la piedoj de la soldatoj premis la korpajn. La mortiga bajoneto ritme movis sin posten-antaŭen.

Glitis al tero tiu nova blua flago.

Mokkrioj kaj huraoj!

Oni dudekfoje enpuŝis bajonetojn tra ĝi: trenis ĝin tra koto: ĝi ricevis bapton en la sango de la defendintoj: ĝin oni suprenĵetis kaj kaptis sur ruĝaj bajonetoj.

"Tri huraojn por la Union Jack!"

(6), kriis kapitano Thomas, dum oni tirtrenis ĝin supren sur la stango, kie antaŭe dum du tagoj flirtis la Suda Stelkruc.

"Gluteton da akvo al mi," ĝemis Ned Moore, kuŝante sur la tero, kun dismalfermita vundo en la ŝultro.

Iu besteca rajdpolicano kolerege turniĝis al li.

"Ribelulo!" Li levis sian bajonethavan pafilon por trapiki lin, sed leŭtenanto Hall—pacon al la ombro de tiu humana homo—flankenpuŝis la kanajlon kaj genuiĝis ĉe la mortanto.

Levetante ties kapon li donis trinki el sia boteleto.

"Elserĉu la terenon! Mortigu ĉiun malvolantan cedi!", iris la tuj posta ordono.

La soldatoj disiris serĉante. Cent dudek kvin kaptitojn ili prenis; multaj el tiuj estis vunditaj.

La barikadojn oni malstarigis, la tendojn kaj barakojn oni ekbruligis. Densa fumo supreniris de la brulanta ligno, kiu nigre forcindrigis la longajn, purpurajn branĉetojn de hardenbergio (hardenbergia monophylla) kaj la delikatan ruĝan erikon.

Tiam klariono trumpetis la alvokon, "Envicigu!"

La soldatoj levis siajn mortfalintojn kaj forportis. Post tiuj venis la kaptitoj, kunkatenitaj po duoj, gardataj de dragonoj, kiuj, armitaj per pistolegoj, estis pretaj kontraŭ ĉia porsava atako. Finposte iris la rajdpolicanoj. Ligita al la vosto de unu ilia ĉevalo, kaj trenaĉata tra ĉiu kotoja, estis la ĉifonaĵo de tiu nova blua flago.....

Tiam la fosistoj revenis al la scenejo de dezertigiteco.

Kia vidaĵo por dimanĉa mateno!

T'eruraj nenomaĵoj, kiuj antaŭ horeto estis viroj plenaj de vivo kaj forto, kuŝis tere, kun vizaĝoj al la blua ĉielo, buŝoj malfermitaj, okuloj larĝe streĉitaj, senbrilaj.

Iuj ankoraŭ agoniis. Kelkaj petegis akvon; kelkaj mortigon. Malgranda hundaĉo malfeliĉege hurlante sidis sur la brusto de sia mortinta mastro. Ĝegmantaj virinoj larmis super la kadavrigintaj edzoj. Tio estis korŝira vidaĵo, sur la deklivoj de Eureka tiu dimanĉmateno, inter la pacaj eŭkaliptoj, la bonodoraj akacioj, la purpura hardenbergio.

La fosistoj forportis la senvivajn kamaradojn. Patro Smyth, unu el la plej mildaj pastroj, rajdis sur sia maljuna, blanka ĉevalino ĝis sur la montetan deklivon. Forte li jam antaŭe penis pacigi la intencon de la fosistoj, kaj multfoje en sia ligna preĝejo li petegis la kongregacion, ke ili ne fluigu sangon.

Deĉevaliĝinte li genuiĝis ĉe unu post alia, jen donante trinkon de brando, jen la finan riton de sia eklezio, jen al nemiembro de sia kunkredantaro kelkajn vortojn de konsolo.

Li ekvidis figuron sub amaso da lignoplatoj. Post du-tri ŝovaĵoj per siaj

fortikaj ŝultroj li sukcesis disigi ilin. Tie kuŝis la ĉefkomandanto, Petro Lalor, verŝajne senviva. De sultro ĝis talio lia ĉemizo estis tramalsekigita de sango.

Patro Smyth kliniĝis super li.

La koro de Lalor ankoraŭ pulsas.

La pastro alvokis fosistojn al si. Ili zorge levis la korpon en siajn brakojn. Lalor ĝemis pro doloro. "Lasu min, pro Dio!"

Unu brako svinge pendis je lia flanko, frakasita kaj senpova.

"Alportu lin en mian loĝejon," ordonis la pastro, kaj la malfeliĉa procesio nerapide foriris.

Venis nokto kaj ĉio silentis ĉe la dezerteca loko, krom nur la stranga krio de numenio el marĉo.

Sola figuro moviĝis en la mallumo, inter la fumigantaj ruinoj—Ĥino (7) portante surŝultre du korbegojn pendantajn je ekstremoj de stango. Li rastis inter la cindraĵo de la estingiĝintaj fajroj, serĉante valoraĵojn ankoraŭ ne tute bruldifektitajn.

Sono alvenis el la arbetoj—dolorĝemo. La Ĥino terurite ŝirkiis kaj forkuris tiel rapide kiel permesis tion liaj korbegoj.

Dezertigiteco! Morto! Silento!

La tago finiĝis.

RIMARKOJ DE LA TRADUKINTO

- (1) La "Commune." Temas pri la Komuno de junio, 1848, en Parizo.
- (2) Vjnegar Hill, monteto en Irlando, estis la scenejo de malvenko de Irlanda ribelantaro antaŭ generalo Lake (elp. lejk) je la 21a de Junio, 1798.
- (3) "larmema patrioto." "Larmema" ĉi tie havas malestiman signifon pri "patrioto," kiu estis larmema pri la maljustaĵoj de sia lando sed ne havis kuraĝon batali.
- (4) "Joes." Moknomo donita de la fosistoj al la rajdpolicanoj.
- (5) "Canadian" (elp. kanejdj'n) estis tiam tendaro de fosistoj apud Ballarat.
- (6) Union Jack. Nacia flago de Granda Britujo.
- (7) Ĥinoj iom tre grandnombre akompanis la unuajn fosistojn alrapidantajn al ĉiu ĵus trovita orloko.

WESTRALIAN ESPERANTO SOCIETY kunvenas ĉiun jaŭdon je 7-30a horo vespere, ĉe 197 Murray St., Perth, kontraŭ Boans Ltd, Prezidanto, S-ro H. Byatt, D.B.E.A. Sekretariino, F-ino E. Griffin, 135 Central-av., Maylands, W.A.

Masterton (N.Z.) Esperanto-Grupo. Prezidanto, S-ro Johns; Sekretario, s-ro H. Franks, 38 Worksop-rd. Kunvenas en ĉiu mardo je la oka horo vespere en la kunvenejo ĉe la Y.M.C.A.

Auckland (N.Z.) Esperanto Societo kunvenas ĉiulunde je 7.30a horo vespere ĉe Nova Preĝejo Halo (New Church Hall), Newton Road. Prezidanto: S-ro J. S. Russell; Sekretario: s-ro Jas. P. Lauder. Komunikaĵojn al la Prezidanto ĉe 2 Pukenui Road, Epsom.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro P. Holmes; sekretariino f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731F, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Scots Church Hall, 97 Russell St. Marde vespere, je la oka horo. R. Banham, "Age" Reading Room, Collins-st., post la 6.30a vespere.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun jaŭdon de 8-10 pt. Ĉe dua etaĝo, "Manning Building," 449 Pitt Street, Sydney. Kontraŭ "Hotel Sydney" kaj apud la ĉefstacidomo. Prezidanto; s-ro E. A. Pryke, D.B.E.A.; Sekretario: s-ro Leslie E. Pfahl, 64 Brighton-st., Croydon.

Brisbano Esperanto-Societo kunvenas la 2-an kaj 4-an mardojn de ĉiu monato en salono de State Service Union, 59a Elizabeth-str.; proksime de konstruaĵo "State Insurance." Prezidanto: Maŭrico Hyde, FBFA. Vicprezidantoj: fraŭlino Rose Macpherson, Klement Kidd. Bibliotekisto: Oskar Behncken (Del. UEA). Sekretario: fraŭlino E. B. Carrick, Office of Supt. of Telegraphs, GPO, Brisbane, Kvinslando (Queensland).

Wellington Esperanto Club.—Meet every Tuesday, 8 p.m., in the Y.M.C.A. Willis St., Wellington. Visitors always welcome. President, Mr. E. C. Jack; Vice-President, Miss Coralie Smythson; Secretary, Mr. Bertram Potts, F.B.E.A. 34, Argentine Avenue, Miramar. Treasurer, Mr. L. E. Dust, D.B.E.A., Del., U.E.A. Write for book list.